# La Espero
SVENSKA ESPERANTOTIDNINGEN

Nro 3/1987 ★ Kr 8,50

# Multaj kontribuis al sukcesa sveda kongreso



**Jen kelkaj kiuj kontribuis al la sukceso:
La parlamentano Daniel Tarschys inaŭguris la kongreson, episkopo Lars Carlzon parolis pri esperanto kiel paca lingvo kaj doktoro John Wells "festparolis".**

## *Esperantoförbundet*

**Adress:** EsperantoCentro, Brunnsgatan 21, 111 38 Stockholm, **Telefon:** 08-11 74 34.

**Esperanto Centro är öppet måndag–torsdag 08.00–16.00 och 17.30–19.00, fredag 08.00–15.00 lördag sept-maj kl 10.00–12.00.**

**Postgiro:** 20 12-3, Esperantoförbundet.

**Medlemsavgift:**

Direktansluten medlem 100 kr
Familjemedlem (utan tidn.) 50 kr
Ungdomsmedlem 50 kr

Prenumerationsavgift för *La Espero* ingår i medlemsavgiften.

Medlemmar under 30 år är samtidigt medlemmar i Sveriges Esperantisters Ungdomsförbund och får dess tidning Kvinpinto. Om du inte får den, meddela födelseår till Esperanto Centro.

## *Esperantoförlaget*

**Postadress:**
Box 7502, 200 42 Malmö.
**Besöksadress:**
Möllevångsgatan 20 B.
**Öppettider:** 1 sept.–15 maj: onsdagar 10–11, torsdagar 17–18.
Skriftliga beställningar expedieras hela året, även under sommaren.
**Telefon:** 040-12 20 29.
**Postgiro:** 578-5.
**Expedition:** Wivi Nilsson.
**Styrelsens ordförande:**
Anita Lindblom.

## *La Espero*

Organ för Svenska Esperantoförbundet

**Adress:** EsperantoCentro Brunnsgatan 21, 111 38 Stockholm tel 08-11 74 34

**Ansvarig utgivare:** Bertil Åkerberg

**Redaktör:** Karin Lindquist
Västermov. 19, 732 00 Arboga
tel 0589-155 31

**Utformning:** Bertil Danielsson,
Prästgårdsv 8, 672 00 Årjäng
tel 0573-105 69

**Fotosats och tryck:**
EsperantoCentro, Stockholm 1986

ESPERANTO
100 år
1887–1987

## *SEF:s styrelse*

**Ordförande:** Karin Lindquist (La Espero massmedia)
Västermov. 19, 732 00 Arboga,
tel 0589-155 31.

**Sekreterare:** Ulla Luin,
Myggdalsvägen 123,
135 42 Tyresö
tel 08-712 82 91

**Kassör:** Börje Andersson (massmedia)
Ingeg. 4 A, 541 50 Skövde
tel 0500-122 05

**Vice ordförande:** Märtha Andréasson, (SEF:s årskongresser)
Pl 2265, 425 00 Hisings Kärra
tel 031-57 11 33

**Styrelseledamot:** Kerstin Rohdin (turnéer, bibliotek)
Ringv. 11 B, 579 00 Högsby
tel 0491-204 61

**Styrelseledamot:** Åke Rohdin (utredningar)
Engelbrektsg. 25 A, 702 13 Örebro,
tel 019-18 53 60

**Styrelseledamot:** Haldo Vedin (utveckling)
Jordbrogatan 57
603 64 Norrköping
tel 011-16 26 87

**Suppleant:** Ingemar Nordin (kansliet).
Mosebacke torg 8, 116 46 Stockholm,
tel 08-41 46 37

**Suppleant:** Bertil Andreasson (utbildning, nordiskt samarbete)
Södra Rörum, 242 00 Hörby
tel 0415-501 52

**Informationskommittén:** Bernt Lindquist
Västermov. 19, 732 00 Arboga tel 0589-155 31

# Gör en insats för UEA under jubileumsåret – bli individuell medlem!

För **220 kronor** blir du MA-medlem, dvs med årsbok och tidningen Esperanto.
**88 kronor** kostar det att bli MJ-medlem och då får du den värdefulla årsboken men inte tidningen.

För at bli SZ-medlem, vilket betyder att du blir medlem i Societo Zamenhof, betalar du ytterligare **400 kronor.** Genom denna avgift gör du en god insats för UEA, som verkligen behöver ekonomiskt stöd för att t ex hjälpa esperantister från länder som inte har samma ekonomiska möjligheter som vi svenskar.

INDIVIDUELL MEDLEM MA eller MJ t o m 25 år blir automatiskt medlem i ungdomssektionen TEJO och får utan kostnad Kontakto. Sådana medlemmar ska anteckna MA-K eller MJ-K på inbetalningstalongen. Andra medlemmar kan prenumerera på Kontakto för 60 kronor per år.

Inbetalning sker till postgiro 14 74 29–5, Esperantoförbundet, Specialkonto.

**Förfrågningar kan göras hos Lisbet Andreasson, Södra Rörum, 242 00 Hörby, tel 0415-501 52.**

ISSN 0014-0694
MAJO 1987
75:A JARKOLEKTO
FONDITA EN 1913

# La Espero

SVENSKA ESPERANTOTIDNINGEN

## La Espero

### Utgivningsplan för 1987

| | |
|---|---|
| Nr 1 | 10 febr (man.stopp 10 jan) |
| Nr 2 | 31 mars (manusstopp 15 febr) |
| Nr 3-4 | 31 maj (manusstopp 15 april) |
| Nr 5 | 31 juli (manusstopp 15 juni) |
| Nr 6-7 | 30 sept (manusstopp 15 aug) |
| Nr 8 | 30 nov (manusstopp 15 okt) |

**Manuskripten skall sändas till redaktören, Västermovägen 19, 732 00 Arboga. Dessa skall vara maskinskrivna med dubbelt radavstånd, inga förkortningar och bokstäverna skall vara rätt övertecknade. Manuskripten skall vara av en sådan kvalitet att en icke-esperantist direkt skall kunna sätta dem.**

**Annonspriser i La Espero**

| | |
|---|---|
| 1/1-sida | kronor 1.200 |
| 1/2-sida | kronor 725 |
| 1/4 sida | kronor 425 |
| 2 spalter x 6 cm | kronor 250 |

## Prezidanto:



Tiu ĉi numero entenas ĉefe raportojn pri nia jubilea kongreso en la Parlamenta domo 10–12 aprilo.

Malgraŭ – aŭ dank' al – kelkaj ŝanĝoj en la lasta minuto la kongreso estis pli enhavoriĉa kaj ampleksa ol ni pensis.

Al la sukceso ankaŭ kontribuis la multaj, agrablaj kaj pozitivaj partoprenantoj.

Afable doktoro John Wells festparolis dum la inaŭgoro anstataŭ profesoro Humphrey Tonkin, kiu venis nur la postan tagon kaj la parlamentano Daniel Tarschys inaŭguris la kongreson anstataŭ Ingemund Bengtsson, kiu malsaniĝis mallonge antaŭ nia kongreso. Ni profunde bedaŭris tion. Li vere ege helpis nin en multaj kampoj dum la lastaj jaroj, kaj pro tio ni ŝatus kaj dezirus ke li estus kune kun ni dum la jubileo.

Daniel Tarschys tamen estis bona anstataŭanto. Li en flua esperanto salutis la partoprenantojn kaj en la nomo de Ingemund Bengtsson inaŭguris la kongreson. Mi esperas ke ni iom post iom konvinkos lin denove esti aktiva esperantisto.

La informriĉa kaj brila prelego de nia mondprezidanto Humphrey Tonkin estis vere aŭdinda kaj por interesuloj ni donos eblecon aĉeti sonbendon kun inter alie lia prelego (vidu alian lokon en la gazeto).

Dank' al Birger Viggen ni ankaŭ povis aŭskulti nian eksepiskopon Lars Carlzon, kiu nun estas konvikita pri la rolo de esperanto en pacaj translimaj kontaktoj. Li ankaŭ donis al ni duonan promeson lerni esperanto ek de lunde.

La jarkunsidon ni glate trapasis dank'al bona jarkongresa prezidanto kaj sekretario. Ni povis bonvensaluti novan estraranon Ulla Luin kaj kun bedaŭro eldanki Anita Lindblom pro multaj kaj efektivaj laborjaroj.

La multaj kontribuantoj al la amuzaj vesperoj donis festan atmosferon al la kongreso.

Aranĝi kongreson, kaj krome jubilean kongreson, estas granda kaj peza laboro kaj ni elkore dankas L K K, kiu tre efektive prizorgis la laboron kaj ni deziras al la nova L K K en Sundsvall bonan sukceson.


**Karin Lindquist**

# La plej granda SEF-kongreso en la plej solena medio

**260 partoprenantoj en la jubilea sveda kongreso en la parlamenta domo en Stokholmo!**
**Rekordo por svedaj kongresoj dum la tuta estado de SEF? Ni demandis multajn veteranojn, Jan Strönne, Lennart Åberg, Bertil Åkerberg, Åke Blomberg – kaj laŭ ĉiuj fakte estis rekordo. Eble iu statistikulo povas pli profunde esplori la aferon.**

En tiu aspekto do tre bona kongreso. Sed ankaŭ el aliaj aspektoj – spite al ĉio.

Spite al ĉio? Jes, komprenu ke dum la plej proksimaj tagoj antaŭ la kongreso estis krizo, preskaŭ paniko. Unue venis la sciigo ke Ingemund Bengtsson malsaniĝis kaj kuŝis en la malsanulejo de Varberg, do ne povis ĉeesti kaj inaŭguri la kongreson. Due venis la raporto ke la UEA-prezidanto Humphrey Tonkin havis tiajn obstaklojn ĉe sia universitato en Usono ke li aŭ estos tre malfruigita aŭ eble tute ne povos alveni.



*Kelkaj el la 260 partoprenantoj.*

## Nervozaj tagoj

La SEF-prezidanto Karin Lindquist preskaŭ loĝis je sia telefono en Arboga por provi solvi la problemojn. De UEA ŝi ekhavis la promeson ke la lerta parolanto John Wells povis anstataŭigi Tonkin. Sed kiamaniere doni al la kongresanoj sufiĉe bonan kompenson por la perdiĝo de Ingemund Bengtsson, nia grandega afiŝnomo?

Ŝi provis kun la kulturministro Bengt Göransson – okupita! La edukada ministro Lennart Bodström – libertempas! Sed la estinto episkopo de Stokholmo, Lars Carlzon, afable jesis. Krome la SEF-kasisto subite memoris ke la parlamentano Daniel Tarschys, fama prezidanto de la sociala komitato de la parlamento, kiel 13-jara knabo, jam fluante parolante esperanton, partoprenis la Helsinoran renkontiĝon en 1956. Eble demandu lin...?

## Tarschys – sensacio!

Daniel Tarschys petis pri unu tago de pripensado. Poste li jesis. Kaj li brile plenumis la taskon kiel inaŭgura parolanto.

En bela, flua esperanto li legis la paroladon de Ingemund Bengtsson, en kiu nia parlamenta prezidanto esprimis sian profundan konvinkon ke esperanto donas bonegan alternativon kiel la lingvo de ĉiuj. Kaj Daniel Tarschys persone en same bona esperanto rakontis ke li antaŭ 30 jaroj ankaŭ partoprenis inaŭguron de esperanto-kongreso sveda, legante poemon en vestaĵo de knaba heroldo...

Gaja sensacio por la kongresanoj estis la apero de Tarschys!

## Episkopa promeso

Ankaŭ episkopo Lars Carlzon parte (komence kaj fine) parolis esperanton kaj tiel bedaŭris ke li ne povis ĉion diri en nia lingvo ke li promesis tuj komenci studi ĝin. Se homoj povus esti unuiĝitaj per komuna lingvo, tio gvidos nin al pli paca mondo, diris espiskopo Carlzon en sia parolado.

## Historia atmosfero

Nun nia referato marŝis iom tro rapide. Antaŭ daŭrigo ni devas rakonti ke ĉio tio okazis en la bela, digna atmosfero de la malnova dua ĉambrego (andra kammaren) de la parlamenta domo. Tie la kongresanoj kolektiĝis vendrede posttagmeze, sentante solenecon neniam antaŭe spertita dum niaj landaj kongresoj. En tia salono oni vere sentas "flugilmovojn de la historio".


Prezidantoj de SEF kaj LKK, Karin Lindquist, kaj Roland Lindblom, prezidanto en la Stokholma klubo, tie bonvenigis nin de la "historia" tablo, bele ĉirkaŭita de floroj kaj kun granda esperanto-flago en la fundo.

## Kial ne la angla?

Kaj nun venis la vico al profesoro John Wells, Londono, fama ling-

# Brila parolado de Tonkin pri niaj fortoj kaj minacoj

**Ĉefpunktoj dum la SEF-kongreso estis la paroladoj de la UEA-prezidanto Humphrey Tonkin. Malfrue li alvenis al la kongreso pro obstakloj en sia universitato ĉe Novjorko. Sed tiuj kiuj atendas ion bonan, ne povas atendi tro longe, diras ja proverbo.**



Oni ja sciis ke Humphrey Tonkin estas tre bona parolanto. Sed dum la lastaj jaroj li eĉ pli evoluigis siajn kapablecojn kaj fariĝis oratoro en la nivelo de Lapenna kaj Privat.

Lia granda apero antaŭ la kongreso kompreneble estis la festparolado dimanĉe pri la temo "Esperanto kaj la futuro". Verve li pentris al ni bildon pri nia nuna kaj estonta situacio.

## La Zamenhofa genio

– Dank al sia fleksebleco esperanto ne estas ligita al eŭropaj lingvoj, li diris. La Zamenhofa genio estis tia ke ni neniam povas kompreni ĉiujn ebecojn kiuj kuŝas en la lingvo. Eĉ tiaj de Eŭropa foraj popoloj kiel la ĉinaj kaj japanaj povas rekoni la lingvon pro ĝia strukturo respektive ĝia vortfarado.

Post konstato pri la interligo inter la lingvo kaj ĝia interna ideo, doktoro Tonkin nombris la premizojn por internacia helplingvo, premizojn kiujn esperanto havas:

1) Lingvo tiel facila ke oni povas lerni ĝin "ludante".

2) Ĝi jam de komence estas akceptita dank al ĝia konstruo.

3) Ĝi povas trovi rimedojn por venki la indifirencon.

## Fortoj, malfortoj...

La parolanto havis ankaŭ aliajn "nombrajn listojn". Li rakontis ke li petis UEA listigi la fortojn, malfortojn kaj minacojn de nia movado.

Fortoj estas ke nia lingvo estas unika, la fideleco de la membroj, la relative granda nombro da instruistoj en la movado, ke la junuloj fariĝas nun pli multaj kaj pli organizitaj, la landaj asocioj kaj la universalaj kongresoj.

Malfortoj estas ke ni forŝlosas la eksteran mondon, ke ni ankoraŭ "estas amatoroj kiuj volas ŝanĝi la mondon, ke ligoj kun landaj asocioj estas tro malfortaj, manko da mono kaj rimedoj, ke niaj organizoj laboras malbone kaj tro da eŭropeco.

## Ekspluatu la anglan!

Minacoj estas malalta lingva nivelo, internaj politikaj skismoj kaj la angla lingvo.

Vojoj por venki tiujn minacojn estas instruado de la lingvo, plia uzo de la kongresoj, instigi la junularon pli okupi sin pri lernigo de la lingvo, utiligi la UNESKO-resolucion kaj ekspluati la anglan lingvon por disvastigi esperanton!

Fine Tonkin petis nin pripensi kio okazos se ni uzos unu horon por disvastigi la lingvon por ĉiu minuto kiam ni nun sidas ĉe internaj kunvenoj. Kaj li finfine provis la iom aŭdacan vortludon: "Ju bileo, des da energio"!

## Landoj devas kunlabori

Humphrey Tonkin ankaŭ aperis antaŭ la kongreso tuj post sia alva spertulo de UEA, kiu anstataŭigis Tonkin kiel malferma parolanto – kaj faris tion per sprita, vigla elokvento.

– Kiel lingvisto mi scias ke esperanto estas la unua provo en la historio kiam lingva projekto transformiĝis en vivanta lingvo, li diris kaj donis vastan vortan pentradon pri la evuluado de esperanto.

– Sed ĉu ne la angla lingvo estas bona solvo de la monda lingva problemo? li demandis sin mem kiel angla lingvisto. Sed, li respondis, en multaj landoj la angla lingvo kiel malnova kolonia lingvo ne estas ŝatata. En aliaj landoj la angla lingvo minacas la naciajn lingvojn kaj kulturojn. Ĉu ekzemple Skandinavio volas fariĝi lingva kolonio?

– Ni esperantistoj spertis la solvon. Nun ni devas konvinki la mondon pri tiu solvo!

## Nia malfacila himno...


Al la tri parolantoj la SEF-prezidanto transdonis belajn jubileajn donacojn memore al la kongreso.

Muzika ensemblo de Järfälla digne kontribuis al etoso de la malferma programo, interalie per la marŝo "Vivu Esperanto". Sed nia himno denove montris sin malfacile kantebla...

Dum la tuta tempo Lennart Åberg simultane tradukis svede la paroladojn al la malmultaj en la salono kiuj ne komprenis esperanton.

**Börje Andersson**

# Ulla Luin en SEF-estraro post laborformiko Anita



*La novelektita Ulla Luin.*

**La jarkunveno de SEF ankaŭ okazis en la malnova dua ĉambrega salono de la parlamenta domo. Nun la SEF-prezidanto ankaŭ povis saluti sian kolegon el Finnlando, Jukka Laaksonen kun edzino kaj la vicprezidanton de LKK en Varsovio, Elzbieta Nawrocka. Norvega Esperanto-Ligo sendis al la kongreso salutan leteron.**

Lerte gvidis la kunvenon la veterano Sune Ahlm, kiu je sia flanko kiel sekretarinon havis Linnea Edzenius.

Per aklamo Karin Lindquist estsi reelektita federacia prezidanto. Anita Lindblom, kiu petis ne esti reelektita, estis anstataŭita de Ulla Luin. (La estraro poste en konstitua kunveno nomis Ulla sekretarion, do en la sama posteno, kiun havis Anita Lindblom). Tri estraranoj, kiuj tiun ĉi jaron estis en elekta vico, reelektiĝis: la kasisto Börje Andersson kaj Kerstin kaj Åke Rohdin. Same ankaŭ anstataŭanto Bertil Andreasson kaj revizoroj Åke Blomberg kaj Bertil Bengtsson reelektiĝis.

## 1503 membroj

La jarraporto estis distribuita al ĉiuj kongresanoj. Jen kelkaj ĉefaj punktoj en ĝi pri kiuj La Espero antaŭe ne raportis:

- 1503 membroj en SEF. De tiuj 128 apartenas al SEJU.
- Informa fako sendis dum 1986 kvin novaĵleterojn al 70 gazetoj.
- "Merkata pakaĵo" pretiĝis, konsista el afiŝoj, dekaloj, diabildserio, broŝuroj kaj glumarkoj.
- La ekonomia raporto montris novan deficiton, 13 632 kr, tamen ne tiel granda kiel dum 1985. La kapitalo daŭre estas granda, 134 717 kr.

Kelkaj estraranoj sciigis pri projektoj dum 1987. Pro perdo de ŝtata subvencio La Espero havos nur 6 numerojn. Lars Forsman informis pri la esperanto-linio en Karlskoga popolalternejo.



*La eksiĝinta sekretarino Anita Lindblom.*

El ka kvin proponoj al la kongreso la klubo en Jönköping havis kvar. La propono pri la vortaro transdoniĝis al Eldona Societo. Pri la propono pri membrolisto ekestis debato. La decido estis ke la jam ekzistanta broŝuro kun adresaro al kluboj kaj respondeculoj estos kompletigota per horaro pri klubaj renkontiĝoj.


Koncerne propono pri infana edukado Bertil Andreasson petis ĉiujn kiuj scias iom pri rezultoj sendi ilin al li. Proponon pri novaj provoj konvinki radion kaj televidon havi esperanto-sendojn la estraro trovis gravan kaj promesas daŭrigi la laboron. Kerstin

veno sabate tagmeze kiel enkondukanto de la diskutrondo. Tie li substrekis la gravecon ke landaj asocioj kunlaboras je propra iniciato sen intervolvo de UEA.

Post la bankedo estis ebleco por ĉiuj fari demandojn al la UEA-prezidanto, kiam estis komuna kolektiĝo en la salonoj de "Grill!!.

La SEF-prezidanto konstatis ke Humphrey Tonkin vere donis al ĉiuj inspiron por daŭra laboro. Kiel memoraĵo ŝi transdonis la unuan svedan lernolibron. La saman donacon ricevis John Wells.

**Börje Andersson**



*La SEf-prez. Karin Lindquist kaj la kongresa Prez. kaj sekr. Sune Ahlm kaj Linnea Edsenius*

# Kongresaj eroj – Sundsvall en vico

Bonege laboris la Stokholma klubo por la kongreso. La ses plejaj laboruloj, Roland kaj Anita Lindblom, Berit Posthuma, Inger Hultqvist, Birger Viggen kaj la zorgema kasisto Arne Lundqvist estas speciale dankitaj de la SEF-vicprezidanto Märtha Andreasson, estrarano por kongresoj.

Kiel memora donaco LKK ricevis la esperanto-banderolon sur la muro de la "Grilla domo". La granda kongresa flago estis simbole transdonita al la reprezentanto de la klubo en Sundsvall, Ingrid Näsholm. Ŝiaj invitaj vortoj donis jam nun scivolemon pri la okazontaĵoj pentekoste 1988.



*LKK-anoj: Roland Lindblom, Anita Lindblom, Birger Viggen, Berit Postuma, Inger Hultqvist kaj Arne Lundqvist.*

Rohdin atentigis ke pretaj programoj por 90 kr nun ekzistas por la Proksim-Radio (Närradion)

Lennart Åberg havis tre detalan proponon pri organiza aktivigo de la movado, plifortigo de organizoj kaj plilarĝigo de la agado. La kongreso decidis pri komisiono kun membroj el SEF, Eldona kaj la Instituto. SEF-reprezentanto en tiu komisiono nomiĝis Lennart Åberg.

## La 24 horoj de Anita

Fine de la kunveno Karin Lindquist kore dankis Anita Lindblom pro ŝia multjara laboro en la estraro kiel sekretario kaj kasisto, prezidanto en Eldona Societo kaj estro en Esperanto Centro. Ŝia laborkapablo estas tiel granda ke estos malfacile anstataŭigi ŝin. Ni esperas ke post ripozo ŝi revenos al la estraro, diris Karin. (Sed la ripozo verŝajne ne estas tre granda ĉar Anita restos diligenta laboranto en la Eldona, precipe pri la vortaro).

Jubilean donacon kaj florojn ricevis Anita, kiu mem diris ke ofte ŝi miris ĉu la tagnokto havas 24 horojn...

Karin Lindquist ankaŭ bonvensalutis Ulla Luin en la estraron, en kiu ŝi cetere ne sidas la unuan fojon.

**Börje Andersson**

## Diservo kun aŭdaca prediko

Multaj kongresanoj venis al la esperanta diservo en la preĝejo de Klara.

Leif Gunnar Nordenstorm tie predikis pri la teksto en Nova Testamento pri la 300 dinaroj, uzitaj por aĉeti ŝmiro al la piedoj de Jesuo. Ĉu ne estis pli bone doni la monon al la malriĉuloj? demandis Judas Iskariot. Eble Jesuo havis la saman penson, kredis la predikanto, sed li ne volis malĝojigi la donacinton. falsa tamen estis la vortoj de Judas, ĉar li tute ne havis zorgojn pri la malriĉuloj. Same falsaj estas niaj svedaj aŭtoritatoj, kiuj multe parolas pri rifuĝintoj sed malmulte faras, diris la predikanto en tre forta paralelo.

En la diservo partoprenis ankaŭ KELI-prezidanto Bengt Olof Nilsson kaj la kantistino Wiltrud Herle. Monkolektado al okulmalsanuloj en Afriko donis 2065 kronojn.

## Aŭkci-fantomo Torsten Lund

Denove Torsten Lund estis gaja kaj tre sukcesa aŭkciisto. Liaj komentarioj, senĉese variaj, mul-



*Aŭkciisto Torsten Lund persvadis nin pagi multoblan prezon por la libroj!*

tobligis la altecon de la proponoj. La rezulto estis 1760 kronoj al la SEF-kaso.

Ankaŭ la vendado de informmaterialo kaj libroj donis bonan rezulton. Åke Rohdin, kiu estris la vendadon por SEF, sumkalkulis preskaŭ 4000 kronojn. Per Eldona Societe interalie nia eta Erika faris admirindan laboron kiu donis kelkajn milojn en la kaso.

## Bone en DN kaj radio

La kongreso donis bonan eĥon en gazetoj kaj radio – almenaŭ antaŭ la kongresaj tagoj. Dagens Nyheter havis duonpaĝan intervjuon kun Ingemund Bengtsson kaj dum unu el la kongresaj tagoj ankaŭ duonpaĝan intervjuon kun Gun Gerdman. La radio havis kelkajn programojn antaŭ la kongreso, interalie unu tre bona kun Ingemar Nordin kaj la trubaduro Roland af Malmborg. Svenska Dagbladet intervjuis Humphrey Tonkin.

Pli malfacile estis interesigi amasmediojn pri la kongresaj okazintaĵoj. Verdire ni devas rekoni ke ni ne havis sensaciojn por regali. Eble ni estonte devas pripensi tiajn...

Prave konstatis iama okupanto de Ringhals: "Por ekhavi atenton ĉe amasmedioj postuliĝas sensacioj. Homoj kiuj vere provas konstrui ion en longa perspektivo apenaŭ ricevas rubrikojn."

**Börje Andersson**

# Amuzo kun polknabinoj kaj pupteatro

La SEF-kongreso donis ne nur laboron sed ankaŭ multe da ĝojo kaj amuzado. La salonoj en la domo de "Grill" ĉe la Grandplaco de la malnova urbo estis el tiu vidpunkto tre konvena.

Tie amuzigis nin kaj dum la interkona vespero kaj dum la dimanĉa distra vespero niaj junaj polaj gastoj, **Anita Mackowska** kaj **Ewa Novakowska.** Ilia longa turneo en la lando ne lacigis ilin. **Bertil Wennergren** kaj **Micke Englund** ankaŭ ludis kaj kantis dum la Interkona vespero. La tesupeo sabate vespere ankaŭ okazis en la "Grillaj" salonoj. Kaj tie kaj dum la samtempa bankedo sur ŝipo "Sjösidan" la pupteatro de **Lisbeth Hamping** el Örebro logis longajn aplaŭdojn. Kvankam ŝi ne estas esperantisto ŝi bonege aktoris en esperanto dank' al la traduko de la dialogoj fare de Kerstin Rohdin. Tiun pupteatron ŝi verkis kaj ellernis juste por nia jubilea kongreso, kaj la ambaŭ prezentadojn ŝi regalis nin okaze de nia jubileo kaj S E F sentas sin tre honorigita.

Bankedoj ofte estas iom tro solenaj aferoj. Sed la ŝipa bankedo ni longe memoras kiel gaja kunestado – ne nur pro la ridetiga pupteatro.

**B.A.**



*Anita Mackowska kaj Ewa Novakowska kantis kaj ludis por ni.*

## Somera Ŝanĝo!

Juna, svisa, 5-persona familio deziras dum 2–3 semajnoj en julio kun gesvedoj ŝanĝi loĝejon. Interesuloj skribu esperante, germane aŭ angle al B. I. + R. van Puijenbroek, Alte Römerstr. 9, CH-8404 Winterthur, Svislando.

# Ljudbandet från kongressen

Den fina tekniska utrustningen i Riksdagshuset gjorde det möjligt att göra en ljudinspelning av god kvalitet. Under kongressen frågade många efter ett redigerat ljudband med de mest intressanta inslagen t ex John Wells och Humphrey Tonkins anförande.

SEF har därför beslutat att ta fram ett ljudband, som kommer att säljas via Esperanto Centro. Beställ det tillsammans med övrigt informationsmaterial. Priset för bandet kommer att bli 50:– + porto.

**Informationskommittén**

# Jarkunveno de SEJU

ESPERANTO FÖRSTÅS!
SEJU

Ankaŭ la junulara jarkunveno ĉi-jare okazis en la parlamenta domo, kvankam sufiĉis iom malpli granda kunvenejo en la kelo. La nekutime digna kadro evidente ne malplaĉis al la dekkvino da partoprenantoj, kies pozoj nature akomodiĝis laŭ deca, nova memrespekto. La formalaĵoj revuis glate. La raportoj agada kaj kasista estis aprobitaj. La revizoroj senhezite rekomendis senŝarĝigon de la estraro. **Lena Månsson** estis unuanime reelektita prezidanto. Nur ĉe la elekto de tri estraranoj por du jaroj aperis problemo. Pro postrestinta eraro de antaŭ kelkaj jaroj, ĉiuj ses ordinaraj estraranoj estis lastjare elektitaj por du jaroj. Por korekti tion, la sekretario proponis formalan eksiĝon de duono el la estraranoj. Fine la estraron por la venonta jaro, krom la prezidanto, konsistigis la jenaj:

**Per Aarne Fritzon, Elisabeth Ahlgren, Berit Posthuma, Stella Lindblom, Per Ola Axelsson** kaj la sola novulo, **Mikael Hultgren** el Norrköping. Tiu lasta kunportas, inter aliaj meritoj, bonvenan breĉon en la lastkelkjara dominado de Stokholmo-Upsalo en la estraro de SEJU. Entute la plej lastatempa evoluo montras esperigan ekfloradon de junaj aktivuloj dise tra la lando. Pro tio la jarkunveno rajtigis al la estraro laŭ propra bontrovo nomi eksterstatutajn anstataŭantojn, kiuj aktive partoprenu en la estrara laboro. Tiu aranĝo ebligos efikan eniron de novaj fortoj sen samtempa perdo de akumulita sperto. La jarkunveno montris aprobon de la lastatempa politiko, laŭ kiu oni koncentrigas la klopodojn por ĉiel helpi stariĝon de aktivulaj grupoj lokaj. Tutlanda junulara organizo havas sencon nur kun forta, aktiva bazo sur loka nivelo. Laŭ tio estas formulitaj novaj planoj de agado, jam parte aplikataj. La prognozo ŝajnas esperiga.

**Per Aarne Fritzon**


Vi ställer ut på



Bok & Bibliotek '87

Information • Dokumentation • Kultur

Göteborg, 20–23 augusti 1987

Välkommen till vår monter:

i hall B.

FÖRLAGSFÖRENINGEN ESPERANTO upa


# Förlagets årsmöte

**Förlagsföreningen Esperantos årsmöte 12 april i samband med SEF:s kongress i riksdagshuset lockade ett hundratal åhörare. Med stort intresse lyssnade de på Derk Dams rapport om arbetet med den svensk-esperantiska ordboken. De tekniska problemen är lösta. Hela texten finns nu på hålremsa. Till och med bokstaven "q" är alla fel rättade. Förutom korrekturläsning av följande bokstäver återstår komplettering av ord som tillkommit sedan 1980. Det finns hopp om att ordboken kan utkomma inom ett år.**

**Förlagets styrelse förblir oförändrad: Anita Lindblom, Åke Blomberg, Bertil Nilsson, Franko Luin och Lennart Magnusson. Suppleanter: Per Aarne Fritzon och Jan Milld.**

**Leif Nordenstorm**

# Korespondpetoj

**Heidun György**
**Kosuth v.12**
**4211 Ebes Hungario**

37-jara hungaro kun 29-jara edzino. Hobioj: Turismo, poŝtmarkoj, bildkartoj. Deziras korespondi kun proksimume samaĝaj geedzoj en Svedujo. Respondos tuj.

**Krzysztof Dobersztyn**
**62-110 Damaslawek**
**Grunwaldzka 15**
**Polando**

23-jara studento deziras korespondi pri turismo, naturo, sporto...



# Samarkanda Klubo petas pri esperantaĵoj

Samarkanda Klubo de Interpopola Amikeco "Esperanto" organizas la internacian ekspozicion pri la agado por la sana vivmaniero, kontraŭ alkoholo kaj fumado en diversaj landoj. Tiucele ni kolektas **ĉiulingvajn** tiutemajn afiŝojn, fotojn, desegnaĵojn, insignojn, gluetikedojn, poŝtkartojn, revuojn, librojn kaj ĉiujn ceterajn propagandilojn de la sana vivmaniero. Ni korespondas tiuteme en Esperanto, la angla, rusa, uzbeka kaj laŭbezone ankaŭ en aliaj lingvoj. Bonvolu sendi ĉion (pleјeble baldaŭ) al:

International Friendship Club "Esperanto"
P.O. Box 76
703 000 Samarkand
Uzbekistan USSR

Al ĉiu helponto ni volonte sendos laŭdezirajn memoraĵojn. Daŭre validas. Represo kaj **nacilingvaj** anonctradukoj dezirataj.

# Svenska Esperanto förbundets ekonomi verksamhetsåret 1986

## Resultaträkning

| Inkomster | 1986 | 1985 |
|---|---|---|
| Medlemsavgifter | 80.485:- | 81.055:- |
| Klubo Cent | 4.600:- | 4.000:- |
| Klubo Cent Jaroj | 6.500:- | 1.150:- |
| Esperanto-Främjandet | 2.660:- | 4.522:- |
| Gåvor | 27.792:- | 22.540:50 |
| La Espero, prenumerationer | 3.166:50 | 3.707:50 |
| La Espero, annonser | 195:- | 217:- |
| Räntor, obl-vinst, kursvinst | 11.033:99 | 12.528:90 |
| Trycksaker | 1.548:50 | 679:- |
| Press-stöd | – | 9.730:- |
| Egna arrangemang | 4.549:82 | – |
| Bokauktioner | 4.382:- | – |
| Turnéer | 291:40 | 1.127:50 |
| Info, försäljning | 19.142:80 | 18.310:75 |
| Förmedlingsprovisioner | 20.704:13 | 12.033:38 |
| SEF-kongressen, netto | 1.722:80 | – |
| Kongressresa | – | 6.840:- |
| Insamling | – | 400:- |
| Diverse inkomster | – | 5.221:55 |
| Underskott | 13.632:74 | 36.700:95 |
| | 202.406:68 | 220.764:03 |

| Utgifter | | |
|---|---|---|
| La Espero | 63.963:27 | 73.676:76 |
| Esperanto Centro | 45.492:50 | 41.864:35 |
| Porto | 13.818:75 | 11.347:09 |
| Verksamheten | 18.566:90 | 24.582:78 |
| SEJU | 9.056:30 | 2.700:- |
| SEF-kongressen | – | 1.548:50 |
| Lön, netto eft. AMS-bidrag | 4.579:40 | 9.278:90 |
| Avgifter till UEA | 4.506:- | 4.244:- |
| Diverse utgifter | 3.782:88 | 9.120:- |
| Avskrivningar | 4.606:- | 1.171:15 |
| Info tillverkn.kostnader | 34.034:68 | 31.699:50 |
| Pressklipp | – | 3.107:- |
| Esperanto-Främjandet, folder | – | 6.424:- |
| | 202.406:68 | 220.764:03 |

## Balansräkning per den 31/12 1986

| Tillgångar | | Skulder | |
|---|---|---|---|
| Inventarier | 14.368:- | Skuld till UEA | 65.585:- |
| Värdepapper | 26.066:70 | Diverse skulder | 11.855:- |
| Postgiro, Stockholm | 36.965:71 | Tidningsabonnemang | 27.705:- |
| Postgiro, Malmö | 75.032:54 | Eget kapital | 134.717:- |
| Bank | 45.321:29 | | |
| Fordran på förlaget | 12.972:38 | | |
| Div. fordringar | 29.061:92 | | |
| Kontant i kassor | 74:98 | | |
| | 239.863:52 | | 239.863:- |

Karin Lindqvist
Ordförande

Börje Andersson
Kassör

Åke Blomberg
Revisor

Bertil Bengtsson
Revisor

# Ny esperanto-dag första lördagen i september

Många medlemmar har tyckt att esperantodagen har legat för sent på året. Därför är den från och med 1987 flyttad till **första lördagen i september.** Gör så att lördagen den 5 sept (1987) blir höjdpunkten på era arrangemang endera som avslutning eller som inledning på en vecka med olika aktiviteter. Det är viktigt att vi håller oss till den här dagen, då den kommer att följas upp av pressmeddelanden från SEF, som går ut över hela landet.

Tänk på att i år är det särskilt viktigt att vi syns och hörs mer än någonsin.

LYCKA TILL MED SVENSKARNA!

Informationskommittén

# Ĉu vi deziras kursi?

**La komitato de SEF pri edukado ofertas al regionoj kursojn pri argumentado, prezentado kaj aliaj varbaj metodoj. Se vi organizos la praktikajn aferojn kiel havigi ejon, sendi invitilojn, prizorgi kafon k.t.p. ni helpos vin gvidi la kurson. Turnu vin al Bertil Andreasson, 0415-501 52 aŭ Märtha Andréasson, 031-57 11 33.**

**Ni ankaŭ povas doni al vi konsilojn pri taŭgaj kursgvidantoj koncerne gramatiko, konversacio, historio, literaturo k.t.p.**

# Gorbatjov:

# Esperanto en la vico!

**– La sola afero, kiun mi metas antaŭ esperanto, estas la restrukturado. Kiam ĝi estas preta, ni pritraktos esperanton!**

Tion diris la soveta ĝeneralsekretario Gorbatjov responde al estona esperantisto, kiu "atakis" lin sur strato en Tallinn, kiam Gorbatjov vizitis la estonan ĉefurbon, raportas la ĵurnalisto Vladimir Simonov en la anglalingva gazeto Moscow News. La artikolon represis la svedlingva "Nyheter från Sovjetunionen".

La estona esperantisto enpenetris tra la amaso da homoj ĉirkaŭ Gorbatjov kaj alvokis lin:

– Michail Sergejevitj! Ĉu vi permesas al mi fari nekutiman demandon?

– Ĉiuj demandoj estas bonvenaj, respondis Gorbatjov.

– Temas pri esperanto-studoj en la lando. Vi certe komprenas kiel grave tio nun estas. Esperanto – tio estas frateco! Estas amikeco! Estas interkunsento...

Gorbatjov ridetis kaj donis la respondon kiun ni komence citis. En la daŭrigo de la artikolo la verkinta ĵurnalisto konstatas ke la nova speco de interrilato inter la soveta gvidantaro kaj la popolo "oni povas nomi esperanto de Michail Gorbatjov".

# Några platser kvar på Warszawa-resan

Intresset för gruppresan till Warszawa har varit så stort att den måste företas med två bussar. Ett fåtal platser finns dock kvar i båda bussarna. För att göra det bekvämare för deltagarna kommer bussarna att gå olika vägar genom Sverige enligt nedan:

**Buss 1**

Start Uppsala – Enköping – Stockholm – Norrköping – Linköping – Motala – Värnamo – E4-an till Helsingborg – Malmö – Ystad.

**Buss 2**

Start Örebro – Askersund – Skövde – Falköping – Borås – Göteborg – E6-an till Helsingborg – Malmö – Ystad.

Upplysningar om påstigningsorter och tider kommer tillsammans med färdhandlingar att sändas till deltagarna.


Se även annons i La Espero nr 8/1986.

Beställningar och förfrågningar kan göras hos **Nord-Syd resor Lars Malmström tel 0171-356 63, 0171-218 44 eller hos Sven Jonsson tel 018-36 35 16.**

NORD SYD RESOR
Bussresor
ENKÖPING

# Impona filatelia ekspozicio

**Filatelio pri Esperanto en la Poŝta Muzeo fariĝis sukceso. Estis Anna-Greta Strönne, Malmö, kiu montris parton de sia granda kolekto de filatelajoj pri esperanto. Estis ne nur poŝtmarkoj kaj poŝtstampoj okaze de esperantoaranĝoj, estis ankaŭ objektoj montrantaj famajn esperantistojn, al esperanto favorajn famulojn kaj iliajn verkojn...**



*Anna-Greta Strönne kun Lars Hedman de la Poŝta Museo kaj Karin Lindquist antaŭ ŝia impona filatelia ekspozicio.*

La ekspozicio vere donis interesan bildon de esperanto en la kulturo kaj en la mondo.

La deĵorantoj de la muzeo surpriziĝis pri la kvalito de la kolekto kaj asertis ke ĝi estus premiota en filatela konkurso.

La ekspozicio donis bonan propagandon por nia lingvo. Ĝi estis menciita en multaj ĵurnaloj kaj filatelaj revuoj kaj kompreneble en la poŝtaj bultenoj.

Laŭ la deĵorantoj de la muzeo ili ricevis neordinare multajn leterojn kaj kartojn por la speciala stampo. Tiuj stampaĵoj ja estas eternaj, oni ne forĵetas ilin, male kolektas kaj konservas ilin. Esperanta ekspozicio en ŝtata muzeo en Svedio estas unikaĵo kaj ni gratulas al Anna-Greta Strönne kaj diras dankon al **Kurt Lindström** kiu iniciatis la ekspozicion.

**I. Nordin**

# Jubileumsåret — Information

Efter en givande och uppmärksammad jubileumskongress i Riksdagshuset känner vi oss stimulerade att sprida information om vårt språk.

Ni har väl inte glömt jubileumsårets motto: Att varje svensk, före 1987-års slut, skall veta vad esperanto är.

Nu är det klubbarnas tur att följa upp massmedias och allmänhetens intresse för oss med information i olika former. Till exempel med utställningar, öppet hus, intensifierade kontakter med studieförbunden om höstens kurser, kontakter med internationella föreningar, närradioprogram, information till skolor m m. Listan kan bli lång. Ni har säkert många lokala idéer vad som kan göras. Till ert förfogande har vi numera ganska gott om informationsmaterial av olika slag. Här följer en lista vad ni kan använda er av.

**Närradioprogram:** 90:-/st
En ljudkassett med 10 avsnitt med information om esperanto.

**Diabildserie:** 325:-/st
25 diabilder med ljudkassett till. Med bildserien följer ett förslag till föredrag för den som vill sköta talet själv.

**Affischserie:** 30:- (1 st); 55:- (2 st); 125:- (5 st)
Åtta affischer som handlar om angelägna företeelser inom esperantorörelsen. Till serien hör en 9:e affisch med bara en rubrik och utrymme för egen textning.

**Broschyr:**20:- (10 st); 75:- (50 st)) 100:- (100 st)
Broschyren heter IDÉN OCH VERKLIGHETEN. Den är upplagd så att den kan användas tillsammans med affischserien eller för sig själv.

**Jubileumsaffisch:** 4:- (1 st); 35:- (10 st)
Speciellt till jubileumsåret har tagits fram en affisch i format A 3. Det gör den användbar i de flesta sammanhang.

**Esperantofrämjarbroschyr:** Gratis
Är framtagen med avsikten att värva sympatisörer.

**Glasblocket:** 90:-/st
Lämpligt minne av 100-års jubileet eller gåva till någon förtjänt "förespråkare" för esperanto eller jubilerande esperantist.

**Nyckelring:** 4:- (1 st); fler än 10 st = 10% rabatt
Enkel gåva till vänner och släktingar och naturligtvis måste du ha en själv!

**Diverse dekaler:**
Lång dekal: 2:- (1 st); 15:- (10 st); 70:- (50 st)
Rund dekal: 2:- (1 st); 17:50 (10 st); 75:- (50 st)
Brevmärken: 11:- (1 karta); 100:- (10 kartor); 475:- (50 kartor)
Avsedda att användas för att spri-

# La plej unuaj

### (El la Enciklopedio de Esperanto)

**Kabe** (d-ro Kazimierz Bein), polo, okulkuracisto. Nask. en 1872. En la E-a mondo li famiĝis, sub la ps. Kabe, per la traduko de la Fundo de l' Mizero de Sieroszewski, kiu aperis en L I en 1904. Ekde 1906 li estis vicprez. de la Akademio. En 1911 li forlasis la movadon, kaj de tiam tute ne okupiĝas plu pri E. La motivoj de ĉi tiu decido estas ankoraŭ neklaraj, verŝajne kontribuis en tio ankaŭ personaj kaŭzoj (malpaciĝo kun Grabowski, Zakrzewski kaj aliaj), sed aliparte estas nekompreneble, ke lokaj kaŭzoj difinu ies sintenon al tia vaste int. afero, kia estas E. Intervjuate en 1931 (L.M. p: 144.), li parolas pri neprogreso de E, kiun li ne rigardas solvo de la int. lingvo. Laŭ tio ĉi, do lian "Grandan Rezignon" motivus principaj konsideroj. Kia ajn estis la kaŭzo de lia retiriĝo la E-istaron vigle okupis ĉi tiu neordinara sinteno, ke iu, ĉe la kulmino de sia E-ista gloro, riĉiginte la lingvon per gravaj laboroj kaj eksterordinara influo, subite, en siaj junaj jaroj, turnas por ĉiam la dorson al la kampoj de siaj riĉaj rikoltoj. Lia nomo fariĝis kvazaŭ la simbolo de apostateco, aŭdante pri "kabeoj" la E-istoj scias, pri kiuj temas. – La du ĉefverkoj de K. estas: Vortaro de Esperanto (vortaro E-a, en kiu la E-ajn vortojn li difinas, tre klare, tre trafe, en ia eleganta maniero) kaj la traduko de La Faraono, granda romano de Prus. –La grando merito de K. estas lia influo rilate al la evoluo de la E-a prozo-stilo. **Lia lingvaĵo estas pura, klara, simpla, vere eleganta, libera de ĉiu naciismo: la "spirito de la lingvo" vivas en lia stilo plenspire kaj sendifekte. Liaj frazoj estas perfekte ekvilibritaj, ĉiu vorto sur sia ĝusta loko. Mankas ĉiu nenecesa komplikaĵo aŭ trologikaĵo; ekz. li preskaŭ ĉiam evitas la kompleksajn verboformojn (estas -inta, estis -anta). Li skribas vere int. E-n, lingvon agrable glatan, lude legeblan.**

---

## Daniel Tarschys rakontas:

# Tial mi lernis esperanton

**Multaj partoprenantoj en la jubilea sveda kongreso en la Parlamenta domo certe surpriziĝis je la bonega esperanto, kiun la inaŭgura parolanto, parlamentano Daniel Tarschys, prezentis – kaj en la legado de la parolo de la malsana Ingemund Bengtsson kaj en la propraj aldonaj vortoj.**

La klarigo estas ke tiu bone konata parlamentano, prezidanto de la socia komitato de la parlamento – "socialutskottets ordförande" – jam kiel 13-jara knabo lernis flue paroli esperanton. Li partoprenis la mondkongreson en Kopenhago kaj la Elsinoran semajnon 1956 kaj poste ankaŭ kelkajn aliajn esperato-aranĝojn. Li mem rakontis en sia kongresa parolado, ke li kiel knabo funkciis kiel iaspeca heroldo dum sveda kongresa inaŭguro...

En gazetara informo, sendita al ĉiuj svedaj gazetoj kaj aliaj amaskomunikiloj, ni intervjuis Daniel Tarschys pri esperanto. Certe interesas ankaŭ la legantojn de La Espero la respondoj, kiujn Daniel Tarschys donis al niaj demandoj:

**– Kiam kaj kial vi fariĝis esperantisto?**

– Mi lernis esperanton tute kiel memlernanto meze de la 50-aj jaroj. Estis treege amuze kaj donis al mi eblecon korespondi kun amikoj en la tuta mondo. Kiel 13-jarulo mi partoprenis internacian esperantokongreson en Kopenhago en 1956.

**– Ĉu vi opinias ke esperanto estas pli facila, lerni ol aliaj lingvoj?**

– Absolute, dank al la logika kaj regula konstruado de esperanto. Rekompence la lingvo malhavas iom da esenco kaj koloro, kiuj eble nur evoluiĝas ĉe naturaj lingvoj. (Multaj esperantistoj certe volas reagi kontraŭ tiu eldiro pri "must och färg", sed en gazetara intervjuo ne estas dece polemiki kun la intervjuito).

**– Ĉu vi havis utilon kaj plezuron pro esperanto?**

– Jes, kaj utilon kaj plezuron. En esperanto mi havis miajn unuajn eksterlandajn kontaktojn. Esperanto donis ankaŭ al mi grandan helpon kiam mi pli malfrue klopodis lerni aliajn lingvojn.

**– Ĉu vi kredas ke esperanto estas pli taŭga kiel mondlingvo ol la angla?**

– Esperanto estas pli facila lerni kaj pli neŭtrala. Aliflanke oni ne povas flankenlasi ke la angla per sia grandega disvastiĝo havas antaŭecon, kiu pli vere grandiĝas. Samtempe mi ofte en Eŭropo rimarkas, ke la angla ne taŭgas en rilato kun ekz francoj kaj aliaj sudeŭropanoj. La malhela vero eble estas ke ni havas sufiĉe longan vojon al unu sola ĝenerala funkcianta lingvo.

**– Kial esperanto ne tute sukcesis ĝis nun?**

– Sufiĉe malmultaj lernas esperanton pro tio ke sufiĉe malmultaj lernis esperanton... Estas malfacile rompi tiun cirklon.

**– Ion alian kion vi volas diri antaŭ la 100-jara jubileo?**

– Cent jaroj fakte ne estas aĝo por lingvo!

Intervjuanto:
**Börje Andersson**

---

da namnet esperanto och visa att vi finns och är aktiva.

**Banderoll:** 175:-
Portokostnader tillkommer.

Kan användas utanför utställningslokaler och liknande. 14 dagars leveranstid.

Som bekant kan allt detta material beställas från Esperanto Centro, Brunnsgatan 21, 111 38 Stockholm, Tel. 08-11 74 34 pg 20 12-3.

Informationskommittén

# Sekvoj en Karlskoga kaj turneo

Sekve de la semajnfina aranĝo en januaro la laboro ĉe Karlskoga Popolaltlernejo nun intensiĝis por enkonduki esperanton en la ordinaran studprogramon. Mi, Karin Lindquist kaj Sven Jonsson estis invititaj al la direktoro Ingemar Gustavsson por diskuti kiel la lernejo kaj SEF povas kunlabori, kaj por interŝanĝi ideojn. Estas ja tiel, ke ni bezonas ilin, sed ankaŭ ke ili bezonas nin (almenaŭ nun en la komenco) – do, agrabla kunlaboro.

**Västerås**

Alia sekvo de la tiuj studtagoj estis ke mi ekhavis kontakton kun ĉ. 20 gejunuloj en meza Svedio, kiuj volas lerni esperanton. Ili petis min aranĝi novan semajnfinan kurson. Tion mi faris la 21–22-an de marto en Västerås. Venis 15 gejunuloj, precipe el lokoj kie troviĝas nek kurso nek klubo. Sven Jonsson kaj Berit Posthuma gvidis la du grupojn. Ĉiuj ŝajne estis tre kontentaj, pluraj jam planas vizitojn al Pollando dum la somero.

**Hallsberg-Östansjö**

La polinoj Anita kaj Ewa faris sukcesan turneon tra nia regiono. Krom prezentaĵoj en pluraj kluboj, la lokaj aranĝantoj ĉifoje vere utiligis la eblecojn por bele reklami por esperanto en la socio. Hallsberg/Östansjö aranĝis tutan tagon en lernejo en Hallsberg, kio vekis grandan intereson. Örebro Kuriren vizitis Östansjö kaj poste aperigis tutan paĝon en la gazeto. Ankaŭ en Motala oni vizitis lernejojn: gimnazion kaj la muziklinion ĉe la LO-lernejo.

En Västerås Anita kaj Ewa aperis en resaniĝulejo en Surahammar (kion ABF malavere pagis) dum vespero ili ludis kaj kantis en la Internacia Kafejo en Västerås. Tiu kafejo estas privata entrepreno enkadre de La Ruĝa Kruco kaj ĉiam estis favora al esperanto. Kunaranĝanto estis la pola klubo.

**Karlskoga**

Ankaŭ Lars Forsman en Karlskoga bone utiligis la viziton de Anita kaj Ewa kaj Harold Brown, kiu vizitis la lernejon samtempe. En plenplena aŭlo li prelegis pri esperanto, la lingvo mem, la monda lingva situacio k.t.p. Lars tradukis la prelegon. Laŭdire multaj tre ekinteresiĝis kaj pluraj volas komenci la kursojn ĉe la lernejo. Dum vespero Lars aranĝis kunvenon, kie Anita kaj Ewa ludis kaj kantis kaj tio instigis al aliaj ludistoj ĉe la lernejo kontribui al la agrabla etoso. Anita, Ewa, Harold kaj Lars vizitis gimnazion kie ili ludis, kantis kaj prelegis en du klasoj. Radio Örebro ankaŭ elsendis programon kun ili.

**Lennart Svensson**

Plej multfacete kaj fantazioplene planis, kiel kutime, Lennart Svensson el Filipstad. Mi ne scias ĉu estas dece rakonti pri liaj metodoj, sed aliflanke, kion ni bezonas estas nekonvenciaj manieroj agadi por esperanto. Nu, tute ruze li persvadis tri komunumojn aranĝi ion kun Anita kaj Ewa – tri komunumoj estis favore el subvencia vidpunkto. Do, li telefonis al Kristinehamn, kaj aludante ke li jam havis jesajn respondojn ĉe aliaj du, li konvinkis La Praktikan Lernejon tie akcepti. Poste li telefonis al Nykroppa, aludante la samon... Fine al Vasabröd en Filipstad... kaj jen la magiaĵo: la bezonataj tri komunumoj! Bona sukceso estis en Kristinehamn kie la studestro tiel entuziasmiĝis ke li petis pri pli da informoj kaj nun pripensas ĉu ili povas starigi kur-


## KARLSKOGA FOLKHÖGSKOLA

## Esperanto-linjen 1987/88

**8-veckorskurser med start**

**31/8 och 11/1 (nybörjarkurser)**

**26/10 och 14/3 (fortsättningskurser)**

**Undervisningen omfattar minst 25 veckotimmar. I kurserna ingår förutom esperanto t ex internationella utblickar och estetisk verksamhet.**

**Moderna kurslokaler, inlärningsstudio, trevliga elevbostäder och vackra omgivningar.**

**Du som är esperantist!**

**Sprid information om dessa kurser till vänner och bekanta.**

**Upplysningar lämnas av Karlskoga Folkhögskola, 691 24 Karlskoga, tel. 0586-503 60 vx.**

## Sommarkurs i esperanto på Karlskoga folkhögskola

**27/6–3/7 1987**

**Nybörjar- och fortsättningskurser**

**Vi välkomnar internationellt deltagande.**

**Studier, utflykter, samkväm.**

**Upplysningar lämnas av Karlskoga Folkhögskola 691 24 Karlskoga, tel. 0586-503 60 vx**

son en iu aŭ alia formo. Ĉe Vasabröd la polinoj ludis kaj kantis dum la lunĉo en la manĝejo – bona aranĝo de Lennart, ĉar tiel oni ne devas reklami aŭ persvadi la homojn veni – ili ja jam estas tie! La lunĉo okazis en tri partoj, kaj la plej altan ateston de la aranĝo eble donis tiu virino, kiu lunĉis dum la unua duonhoro: "damne", ŝi diris," ke la maŝinoj ne paneis hodiaŭ" Lennart ankaŭ iris kun la knabinoj al Karlstad por esti intervjuita en Radio Värmland. (Fakte ankaŭ estis li kiu iniciatis la intervjuon en Örebro, supre menciita).

Ankaŭ estis lia "kulpo" ke la knabinoj venis al Årjäng, tie ili aperis en lernejo tage kaj en la biblioteko vespere.

**Gunilla Sundholm**

## Suda regiono

La 21-an de marto Suda Distrikto aranĝis seminarion en Helsingborg kun la temo Kiel argumenti por esperanto kaj kiel interesigi diversajn grupojn por la internacia lingvo. Märtha Andréasson gvidis la tagon kaj 22 personoj partoprenis. Ŝi ankaŭ iomete parolis pri Virina agado.

Ankoraŭ estas tempo sin anonci al **semajnfina kurso la 13–14-an de junio en Gullbranagården,** apud Halmstad. La distrikto aranĝas en kunlaboro kun la popolaltlernejo en Markaryd. Ni invitas vin al kvar diversaj "ŝtupoj". La kvara grupo okupiĝos pri literaturo, eroj de la 100-jara literatura trezoro. Iva Åberg gvidos tiun grupon. La lasta tago por aliĝo estas la 1-an de junio. Por ricevi **informojn telefonu al Lisbet Andreasson, 0415-501 52.**

El la vivo de la kluboj ni povas noti la sekvantan.

La klubo en Lund aranĝis ekspozicion, parte filatelian, dum tri semajnoj en la ĉefa poŝtoficejo.

En Malöm la klubo aranĝis ekspozicion, eksterordinare grandan, en la biblioteko de Arlöv.

La Mezskania Esperantoklubo sendis leterojn al diversaj kluboj en la listo pri organizoj en la komunumoj kaj oferis informon pri esperanto. La rezulto ĝis nun (kiam mi skribas) estas ke kvar organizoj petis pri nia programo, inter ili la loka instruista sindikata organizo kaj Hem- och Skola en Hörby por ilia jarkunveno.

**Lisbet Andreasson**

## Okcidenta regiono

### Kursoj, ekspozicio, ekskursoj

La preparlaboro pri la kurso en La Nordia Popola Altlernejo en Kungälv pluiras. La programo enhavas i.a. viziton en Sveriges Radio/Television en Gotenburgo, "Esperanto – 100 år" kun kontribuo i.a. de Petâr Todorov, Sofio, viziton en la amuzejo "Liseberg" en Gotenburgo kaj kant- kaj dancvesperon kun Reine. La kursgvidantoj ricevos instruon de Audrey Childs-Mee kaj ankaŭ la ▷

# Donacoj

### Klubo Cent

| | |
|---|---|
| K.H. Persson, Motala | 100:- |
| Jarl Hammarberg, Bromma | 100:- |
| Arvid Johansson, Huskvarna | 100:- |
| Bertil Bengtsson, Hallsberg | 100:- |
| Hässleholms Esperantoklubb | 100:- |
| Gun Gerdman, Stockholm | 100:- |
| Harald Andersson, Grythyttan | 100:- |
| Tore Johansson, Kalmar | 100:- |
| Signhild Johansson, Kalmar | 100:- |
| Bosse Pettersson, Nynäshamn | 100:- |
| John Wik, Kalmar | 100:- |
| Olle Olsson, Lund | 100:- |
| Åke Palm, Malmö | 100:- |
| Adolf Westman, Björna | 200:- |
| Rune Ekmark, Sandviken | 200:- |
| Gertrud och Torsten Lund, Malmö | 200:- |
| Fritz Ström, Kumla | 100:- |

### Klubo Cent Jaroj

| | |
|---|---|
| Ivar Andersson, Tranås | 100:- |
| Arvid Johansson, Huskvarna | 100:- |
| Harald Andersson, Grythyttan | 100:- |
| Ruben Enocson, Solna | 200:- |
| Tore Johansson, Kalmar | 100:- |
| Signhild Johansson, Kalmar | 100:- |
| Magnus Persson, Söderköping | 100:- |
| Anna Ekbom, Boden | 100:- |

### Donacoj

| | |
|---|---|
| Luise Karlsson, Nynäshamn | 5.000:- |
| Birger Viggen, Stockholm memore al Sten Öfors | 100:- |
| Eliud Carlsson, Kiruna | 50:- |
| Hälsingborgs Esperantoförening | 300:- |
| Nils Johansson, Norrköping al jubilea jaro | 1.000:- |
| Henry Almar, Trollhättan | 200:- |

Denove ni ricevis akciojn de Sven Sundin el Växjö laŭ jene:
50 akcioj A en EUROC INDUSTRIAKTIEBOLAGET kaj
15 akcioj B en EDEBE PROMATION AKTIEBOLAG

Al li kaj aliaj "granddonacintoj" ni esprimas specialan dankon kaj al la aliaj donacintoj ni ankaŭ elkore dankas – "el multaj riveretoj fariĝos rivero" – Kaj ni bezonus riveregon da mono por atingi nian celon. Do, nia poŝtĝira konto estas 20 12 -3, por pliaj malavaraj donacoj!

La estraro de SEF

## DANKON



KM 07

Posttidning
Avs. Svenska Esperantoförbundet
Brunnsgatan 21
111 38 Stockholm
HAR DU ÄNDRAT ADRESS?
**Fyll i rätt adress och skicka in *hela* remsan (även den gamla adressen) till SEF.**

HERR
STEN SVENONIUS
ERIKSTORPSGATAN 26 A

217 54 MALMÖ

***Märtha Andréasson:***

# Pedagogia-metodika seminario en Pisanica, Bulgario

1–7 aprilo okazis en Pisanica en Bulgario la 5a Internacia Metodika Seminario. Ĝin partoprenis ĉ. 45 instruistoj aŭ kursgvidantoj. La plej multaj venis el Bulgario, sed venis ankaŭ el Orient-Germanio, Hungario, Italio, Pollando kaj Svedio.

La temo por la ĉijara seminario estis "Instruhoro en la 2a grado". Kiel gvidanto por la seminario funkciis Marin Baĉev, estrarano de ILEI. Estis 5 tagoj plenaj de aktivecoj, la unua kaj lasta estis vojaĝtagoj. Taga programo estis: 3 prelegoj antaŭ la lunĉo, 3-hora ripozpaŭzo, 2 prelegoj posttagmeze, vespere kolektiĝis la kantemuloj kaj laste ankaŭ la dancemuloj en la diskoteko.

## Kiel fari la instruhoron

La plej multaj el la prezentadoj, **"Kiel fari instruhoron"** estis interesaj kaj bonegaj kaj ankaŭ bonege prezentitaj, dum kelkaj ne allogis, eble plej pro teda prezentado.

Jen kelkaj titoloj, kiuj vere allogis min. "Kiel la junularo ŝatas lerni Esperanton" de Mariana Elenova, "Pri instrumetodo en ĝenerala E-klubo" de Katarina Farago, "Pri iuj novaj Esperantometodoj" kaj "Pri sugestopedio kiel instrumetodo" de Marin Baĉev, "Praktika instruhoro – unueco de kelkaj procesoj" de Till Dahlenburg, "La komputilo en la E-instruado" de Bojan Lalev, "Kanzono – eduka kaj refreŝiga rimedo" de Irena Szanser kaj fine "La arto en la fremdlingva instruado" de Olga Cankova.

Vere estis ankoraŭ prelegoj, pli ol 20. Sed de ĉi tiuj menciitaj titoloj vi eble povas havi imagon kiel varia kaj instrua la seminario estis. Post ĉiu prelego sekvis diskuto kaj rimarkigoj pri la prezentado.

**Estis ankaŭ ekskursoj**

En la programo estis ankaŭ du ekskursoj – al Smoljan kaj la planedario tie kaj al la skiloko Pamporovo, kie la neĝo ankoraŭ kovris la teron.

**Kursoj por infanoj kaj gejunuloj**

**Estis en la kursejo pluraj aliaj grupoj – junularaj el Bulgario, kaj samtempe okazis kursoj por infanoj. En tiuj partoprenis i.a.**

**13 svedaj infanoj el Hålabäcksskolan en Kungsbacka, kiuj havos interŝanĝon kun lernejo en Sofio pri vizitoj en Bulgario respektive en Svedio. La 20 infanoj, kiuj venos al Kungsbacka komence de junio, ankaŭ ĉeestis en Pisanica kune kun 3 gvidantoj. Respondeca por la sveda – bulgara interŝanĝo estas Inga-Lill Tyrefelt kaj ŝi havis kun si helpanton.**

**Tranoktado en privataj hejmoj**

Mi vojaĝis kun la grupo al Sofio kaj tie ni estis akceptataj en la flughaveno de la bulgaraj infanoj kun gepatroj kaj invititaj hejmen al ili por tranoktado. La postan tagon ni per aŭtobuso de la lernejo en Sofio estis transportataj al Pisanica, al la kursejo. Survoje hejmen la sveda grupo loĝis ankoraŭ 2 noktojn en privataj hejmoj en Sofio.

**Esperantokursoj**

Kune kun kelkaj bulgaraj infanoj la svedaj gejunuloj, 13–14-jaruloj, ĉiutage ĉeestis esperantokurson dum 2–3 horoj, kaj ili vere multon lernis dum tiu 10-taga periodo.

**Revizito en Svedio en julio**

Komence de julio la bulgara klaso venos al Svedio. Tiam eble Inga-Lill kaj ŝiaj gelernantoj havos problemojn fari same ampleksan kaj enhavoriĉan programon, ĉar vere ĝi estis bonege aranĝita. Sed certe ili, per helpo de la gotenburgaj esperantistoj, sukcesos rekompensi la gastigemon de la bulgaroj.

---

aliaj grupoj havos spertajn gvidantojn.

De Gotenburgo ni povas raporti, ke estis eta filatelista ekspozicio en poŝtoficejo. Poŝtoficisto ekvidis la poŝtmuzean ekspozicion en Stokholmo kaj ekinteresiĝis, trovis la nomon de Inga Johansson en la konata "Kor(r)espondu", kaj proponis ekspozicion en la poŝtoficejo en Ekelundsgatan. Poste en la sama poŝtoficejo Inga faros ekspozicion pri origamio.

Skövde prezentis sian programon por la printempaj monatoj. Temas pri ekskursoj al tre popularaj ekskursceloj kun samtempa esperantoekzercado. Ankaŭ oni prezentos programon pri la ĉijara kongreslando Pollando.

Falköping sendis proponon pri esperanto al la loka UN-organizo.

**Märtha Andreasson**